

N°179  
juillet  
août  
septembre  
2017

# LA INFORMILO

N° 179  
julio  
aŭgusto  
septembro  
2017

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières

Esperanto  
la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

**esperanto**  
France-Est

**ESPERANTO**  
**2017**  
*Justa komunikado*

## ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

## ESPERANTO

regroupant  
les départements

**Bas-Rhin (67)**

**Haut-Rhin (68)**

**Meurthe-et-Moselle (54)**

**Meuse (55)**

**Moselle (57)**

**Vosges (88)**

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

**FR-54000 NANCY**

## ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 17€

Reta abono: 7,50€



Le 102<sup>ème</sup> congrès mondial d'espéranto à Séoul (Corée du Sud)

L'Asie a accueilli le 102<sup>ème</sup> congrès mondial d'espéranto à Séoul (Corée du Sud) du 22 au 29 juillet 2017. Dès le premier jour le site <http://novajhoj.weebly.com/> a diffusé des images de la séance d'ouverture et les membres d'Espéranto France-Est ont eu le plaisir de voir notre délégué régional, André GROSSMANN, entrer dans la salle, muni de son appareil-photo, et prêt à nous rapporter des images pour LA INFORMILO.

Des interviews de délégués des 5 continents ont été diffusés. Ce congrès a donné l'occasion de pratiquer l'espéranto dans une rencontre internationale aux espérantophones asiatiques qui, souvent très jeunes, parlaient couramment et ne cachaient pas leur plaisir de s'exprimer en espéranto. Rappelons que la Langue Internationale reste de très loin – et cela pour des locuteurs des cinq continents – la langue vivante assimilable plus rapidement que n'importe quelle langue étrangère. Ce congrès l'a démontré une fois de plus.

Les excursions organisées par le comité local ont permis aux congressistes de découvrir les hauts-lieux de la Corée du Sud et les us et coutumes du pays.

Un groupe de 3 espérantophones français, Nathalie Kesler, Marianne Dunlop et François Lo Jacomo ont même pu découvrir la Corée du Nord grâce à l'Association d'Amitié Franco-Coréenne. Ils ont même pu rencontrer le linguiste nord-coréen Jong Sun Gi qui leur a déclaré qu'en 1951 des étudiants en langues européennes avaient appris l'espéranto. Ils ont aussi pu présenter la Langue Internationale dans des collèges et lycées à des élèves studieux et très intéressés. Pendant tout leur voyage à travers le pays ils ont été accompagnés par deux guides locaux qui leur ont déclaré à la fin du séjour qu'ils allaient apprendre la langue. Peut-être un jour un congrès mondial à Pyongyang...

Articles: (Le monde de l'espéranto p. 18 - <http://esperanto-france.org>)

<http://www.amitiefrancecoree.org/2017/04/des-esperantistes-invites-a-pyongyang.html>



## LA 50-a ILEI-KONGRESO EN BUSAN de la 15a ĝis la 22a de julio 2017



Meze de julio ILEI malfermis la serion de tri esperantaj kongresoj en Koreio. Post ĝi sekvis la 102-a UK en Seulo kaj tuj poste la 90-a SAT-kongreso en la apuda urbo Gimpo.

La kongreso de ILEI okazis de la 15-a ĝis la 22-a de julio en la dua plej granda urbo en Koreio Busan, situanta en la suda parto de la lando. Fakte la kongreso estas la unua kun tiu-ĉi nomo. La decido estis prenita pasintjare en *Nyíregyháza*. Antaŭe temis pri ILEI-konferencoj.

La kongreson partoprenis 170 gesamideanoj el 21 landoj. La akcepto estis varma, same kiel la lando mem. Ni loĝis en komfortaj ĉambroj de la junulara gastejo *Arpina*. Ĉiuj programeroj okazis en la oka etaĝo de la konstruaĵo. La temo de la ĉi-jara kongreso estis: "Edukado al Respektoplena Turismo". Ĝi estis plenumita per kelkaj prelegoj kaj kompreneble per ekskursoj al interesaj lokoj.



Ĉarma figuro okaze de korea vespero

Sabate, dum la interkona vespero ni gustumis ĉefe aziajn kaj kelkajn alilandajn frandaĵojn. Koreaj esperantistoj dume prezentis belegan folkloran programon kun

specifaj dancoj kaj muziko de sia kulturo. Krom variaj prezentadoj ni ĝuis gruo- kaj masko-dancojn.

Dimanĉe okazis la solena inaŭguro kun ĉeesto de kelkaj reprezentantoj de la urbo Busan. La prezidantino de ILEI, Mireille Grosjean, bonvenigis la kongresanojn.



Estis legataj kelkaj bondezir-mesaĝoj. Dum la paŭzo ni aŭskultis specialajn koreajn muzikilojn. Sekvis salutoj de reprezentantoj de ĉeestantaj landoj kaj la prezidantino konigis al ni la kongresan temon pri turismo. Post la malfermo de la kongreso ni komune fotiĝis.

La Nacia vespero mirigis ĉiujn ĉeestantojn. Ni ĝuis variajn prezentadojn de la korea folklor-kulturo. Subtila estis *Dongrae*-la gruo-danco, konata jam de la unua vespero.



La semajna programo inkluzivis E-kurson por komencantoj gvidatan de Annie Grente, progresantoj ĝuis viglan kaj amuzan kurson de Sylvain Lelarge kaj la instruistan trejnadon mastris Katalin Kovats. La fidelaj



Partoprenantoj el plej diversaj landoj, kunĝojas pro la agrabla korea vespero.

partoprenantoj ricevis atestilon. Ne mankis lernado de la korea lingvo eksprese sub gvido de Park Yongsung (Nema). Oni diskutis pri la maniero enkonduki Esperanton en lernejojn. Ĝis nun oni vane strebis pri tio. Tamen, ni estas esperantistoj, do ni devas esperi... En aliaj programeroj oni parolis pri gramatikaj tiklaĵoj, pri E-centroj kaj pri privataj projektoj. Komitatanoj plenumis laboron dum pluraj kunsidoj kaj ankaŭ estis pri-traktita la "Jaro de la Lernanto".



Jen la kursoj de Sylvain Lelarge

Sur la urba placo, antaŭ la teatro okazis lingva festivalo kun 16 lingvoj inkluzive Esperanton prezentitaj de la kongresanoj. Por la publiko, kiu bedaŭrinde ne abundis, estis aranĝita speciala kultura programo.

Ni spektis kvar filmetojn el filmokonkurso okaze de la Jaro de la Lernanto. Ni aljuĝis al unu el ili la premion de la publiko. Rilate al la temo pri turismo oni parolis pri la fama mond-vojaĝanto kaj verkisto Tibor Sekelj. Marija Belošević parolis pri pozitivaj kaj negativaj efikoj de turismo. Aurora Bute vestita en bela rumana kostumo parolis pri kulturaj specifaĵoj de Rumanio. La rumana bluzo inspiris plurajn famajn modistojn.



El Rusio kantas Aleksei Borodin

Tre bongusta kaj enhavriĉa estis la kongresa bankedo en urba restoracio. Ĝi kontentigis ĉiujn ĉeestantojn per varia elekto de koreaj specialaj manĝaĵoj.

Al kongresanoj estis proponitaj pluraj duontagaj ekskursoj por malkovri la ĉirkaŭaĵon. Unu el la tuttagaj ekskursoj estis destinita al vizito de la urbocentro de Busan. Alia tuttaga ekskurso celis la regionon de Gyeongju, kie ni vizitis antikvajn tombojn. Unu el ili estis enrigardebla. Sekvis vizito al monaĥejo, kie ni tagmanĝis kaj plonĝis en meditadojn. Impresa estis vizito al templo Bulguksa, mondheredaĵo de Unesko.

Ĉe la fino de la kongreso estis prezentita la Iberia duoninsulo, kie okazos ve-



El Nepalo dancas Eternalumo



Mirejo, lokaj kongresaj komitatanoj kaj helpantoj

nontjare la 51-a ILEI-kongreso en la hispana ĉefurbo Madrido de la 21-a ĝis la 28-a de julio. La portugala ĉefurbo Lisbono gastigos la 103-an UK-on tuj poste. Mireille Grosjean prezentis konkludan paroladon pri la kongreso kaj pri la Rezolucio. Sekvis dankoj kaj gratuloj al busanaj esperantistoj, kiuj sukcesis organizi belegan kongreson. Tiele plenumiĝis bondeziroj de urbaj reprezentantoj eldiritaj ĉe la inaŭguro.



Ni ĝuis viglan kaj agrablan semajnon.

*Liba Gabalda*

## Tuttaga ekskurso al la regiono Gjeonĝu



Ni ankaŭ kune meditis kun la ĉef-pastrino. Certe interese kaj eble iom enigma sperto.



Ĉirkaŭ la templo estis ege belaj lotuso-ĝardenoj



Tiu tuttaga ekskurso celis la regionon de Gjeonĝu. Tie troviĝis pluraj antikvaj tomboj de famaj koreaj reĝoj sub tumulo (ter-amaso). Unu el ili estis vizitebla. Ene troviĝis diversaj trezoroj, ora krono, pentraĵoj.

Poste ni vizitis templon, en kiu ni ĝuis tipan vegetaran manĝon. Ĉiu sidis ĉe



Impresa estis vizito al templo Bulguksa, mondheredaĵo de Unesko.



malaltaj tabloj. Dume ekstere sur tabloj multe da fruktoj estis proponitaj kaj tute bonvenaj en tiu varmega vetero. Poste, la tuta grupo ĉeestis la ceremonion, kiu komenciĝis per tamburado. Tamburado povas utili por milito, sed ankaŭ por religio. Ni ricevis tiel multe da klarigoj pri la celo de tiu ceremonio.



Estis agrabla ekskurso kun interesaj spertoj kaj konatiĝo kun la kulturo de Koreio. Per buso ni revenis al Busan 3 horojn poste.

Andreo

## Gejunuloj ĉe ILEI-KONGRESO


Al tiu kongreso aliĝis multaj gejunuloj, ĉefe el aziaj landoj. Ili multe interesiĝis pri Esperanto, deziris havi kontaktojn kun alilandaj gejunuloj kaj diligente sekvis la diversajn proponitajn kursojn. Jes, ili deziras nepre progresi en la lingvo.

En Koreio kaj aliaj aziaj landoj esperantistoj kutimas doni al si Esperanton, eble por faciligi la prononcon de sia nomo.

Jen, ni konatiĝu kun Eternalumo. Ŝi estas juna studentino en Nepalo kaj unuafoje partoprenis tian kongreson en eksterlando.

Ŝi volonte raportas pri siaj impresoj kaj spertoj. Ni kune ĝuu ŝian plenan entuziasmon kaj ŝian junecon. Ni deziru al ŝi multajn sukcesojn kaj plezurojn en Esperantio.

Estis mia granda plezuro partopreni en la 50a ILEI-kongreso kaj la 102-a UK de Esperanto. Tiu ĉi estis mia unua eksterlanda kongreso kaj ankaŭ unua UK de Esperanto, en kiu mi partoprenis. Por la impresoj kaj sperto pri tiu ĉi UK kaj ILEI-Kongreso mi diru, ke ĝi estis interesa kaj agrabla por mi. Mi multe ĝuis, promenis, partoprenis en diversaj programoj, amikumis kaj samtempe mi havis ŝancon por progresigi mian Esperanto-nivelon.



Mi estis tre scivolema antaŭ la partopreno; kio okazos, kiel paroli kun alilandaj esperantistoj, kia-maniere amikiĝi k.t.p. Sed mi miris tiam, kiam mi troviĝis tie, ke mi ne estis inter eksterlandanoj, fakte mi estis kvazaŭ kun miaj familianoj. Ili ne estis fremdaj, ili estis kiel miaj familianoj. Mi konatiĝis, babilis, ĝuis kun multaj esperantistoj aŭ mi eĉ diru, ke mi konatiĝis kun miaj esperantistaj familianoj, kiuj loĝas en diversaj mondpartoj. Mi amikumis kaj ĝuis kun junaj esperantistoj. Kaj aldoniĝis pli da kialoj en la listo "kial lerni Esperanton". Antaŭe mi nur legis Esperanton, sed post la partopreno mi vere konis, kio estas Esperanto kaj ĝia movado. Mi partoprenis en multaj programoj dum la UK kaj ILEI. Kursoj por la progresantoj gvidataj de Sylvain estis vere utilaj por mi.



Krome mi ankaŭ sukcesis ricevi atestilon el la mano de gravulo Hori Jasuo por la sukcesa kantado de la himno. Mi estis tre feliĉa tiam. Kaj ankaŭ la ekskurso por Azia grupo aranĝita de KAEM estis tre agrabla, mi povis scii kaj viziti la famajn vizitindajn lokojn de Seulo.

Mi havis tre agrablan ILEI-kongreson en Busano, partopreninte diversajn programojn; ĉefe instruista trejnado gvidata de Katalin. Tiam mi povis scii multe pri Esperanto. Miaj koreaj ge-amikoj multe helpis min dum la restado en Busano kaj en Seulo. Mi ne havas vortojn kia-maniere danki ilin.

UEA kaj ILEI sendis sufiĉe da dokumentoj al mi por akiri vizon al Koreio. Tio multe helpis min kaj mi povis facile ricevi la vizon kvankam tio estis mia unua vizopeto. Ni ses nepalanoj grupe akiris vizon, kune aĉetis flugbileton kaj kune partoprenis. Pradip Ghimire, ĉefo de nia grupo multe helpis min. Mi tre dankas al li pro lia helpo. Ni ekiris la 12an de julio al Koreio kaj restis 10 tagojn en Busano. En la 22a de julio ni

ekiris al Seulo por partopreni en la 102-a UK kaj ni sukcese partoprenis. Ni multe kongresumis kaj la 2an de aŭgusto ni revenis al Nepalo portante multajn meroraĵojn en la kapo.

Mi tre ŝatas la ideon de Esperanto. Mi daŭre agados kaj propagandos Esperanton en mia tuta vivo. Mi antaŭ la partopreno en UK propagandis pri Esperanto al miaj kolegoj kaj al konatuloj, ili multe interesiĝis pri Esperanto, do nun mi planas instrui Esperanton al ili. Dum la tuta vivo mi daŭre subtenos Esperanton. Dankon!


Amikine  
Eternalumo.



## Postkongreso al plej suda Korea Insulo Ĝeĝu

UEA proponis 4 postkongresojn. Por P4 estis proponita turismado sur la plej suda insulo Ĝeĝu (Jeju). Post la fermo de la kongreso necesis private atingi planitan hotelon en Seulo. De tie la postan tagon ni veturis al la interna flug-haveno Kimpo. En la sama mateno ni jam komencis la turismadon sur la insulo Ĝeĝu.

Nia grupo konsistis el 12 partoprenantoj el Japanio kaj el iuj eŭropaj landoj kaj 2 koreaj interpretistoj.



La insulo ampleksas 78 km da longo kaj 45 km da larĝo. Ĝi originis el ege malnova vulkano, tial ĝia subtero estas el lafo-ŝtonoj, kiuj kvazaŭ spongo kolektas la pluv-akvojn. Sur la insulo troviĝas neniam rivero. Preskaŭ ĉiu-tage pluvas unu aŭ du-foje dum duonhoron.



Pro tiuj geologiaj originoj iuj ĉirkaŭaj insuletoj ekhavis diversajn formojn, kiuj inspiris la loĝantojn.

Jen rokaĵo je formo de muĝanta drako. Tie la ondoj frakasigas sur la klifoj kaj kelkfoje alten ŝprucas. Ĉu la drako kolere elkracas? Almenaŭ ĝi allogas la turistojn, kiuj povas promeni laŭ-

longe de la instalitaj padoj kaj ŝtuparoj.



La vetero estis ege varma, sed interne de buso kaj restoracioj funkciis klimatiziloj, kiuj mildigis la varmecon, kelkfoje eĉ tro draste. Malgraŭ tiu varmego, ni povis ĝui interne de muzeo "glacio-mondon". Tie troviĝis pluraj glacio-skulptaĵoj, glacio-glitejo, eblis eĉ stiri glacio-aŭton.

Aliloke, mirindaj bildoj donis la iluzion pri 3 dimensiaj fotoj, tiel nomata 5D arto.



Sur tiu foto, nur la du virinoj (niaj du gvidantinoj) estas realaj, la cetero estas nur bildo.



En la vespero estis proponita teatraĵo kun tamburoj. Fakte temis pri vasta kuirejo, kie 4 "gekuiristoj" ege lerte manipulis la diversajn ilojn, la kaseroloj iĝis tamburoj, la teleroj flugis trans la kuirejo, sed estis rapide kaptitaj. La tranĉiloj fulmrapide tranĉis legomojn, kiuj flugis tra la scenejo. Ege amuzan spektaklon ni povis ĝui.



## Udo

"U" signifas bovo kaj "do" Insulo. Udo estas la plej granda insulo de Ĝeĝu kaj havas formon de kuŝanta bovo. Nuntempe ĉiujare svarmas turistoj pro ĝia fameco, sed ĝi estis senhoma antaŭ 150 jaroj. Nun loĝas tie 600 familioj, kiuj sin vivtenas per agrokulturo kaj fiŝkaptado.

Eblas atingi la supron de Udobong-monteto tra milda dekliva vojo kvazaŭ sur bova dorso, ĝis 132 m da alteco. De supre etendiĝas delikate diversaj pejzaĝoj kun Songsanbong kaj la ĉefinsulo Ĝeĝu.

Nuntempe ankaŭ en Koreio estas modo migradi. Ĝeĝu estas la startpunkto de tiu modo en Koreio. Ĉirkaŭ-migradi en Ĝeĝu nomiĝas "Ole" kaj tio signifas en la loka dialekto "la vojeto kondukanta al la ĉefstrato de la hejmo". Itineroj por migradi sur Ĝeĝu konsistas el vojetoj ene de la vilaĝoj, montoj, kampo kaj laŭ la marbordoj. Ekde la pretigo de la unua itinero en 2007, nun entute 425 km kun 26 itineroj estas faritaj. La longo varias, sed ĉiu itinero postulas 5-6 horojn kaj ĉe la fino eblas ricevi atestilon. La plej populara itinero estas la 7a kun ĉirkaŭ 17 km kaj ĝi fieras pro siaj pitoreskaj pejzaĝoj. Survoje troviĝas la ruĝa poŝtkesto, tiam vi enmetu skribitan leteron kaj la vilaĝanoj de tiu distrikto sendos ĝin al vi unu jaron poste por rememorigi al vi la pasintaĵon.



Ni ĝuis agrablajn promenadojn laŭlonge de la marbordo kaj tra belaj verdaj ĝardenoj. Ĉie abunde kreskas arboj, plantoj, en botanika ĝardeno Jomiĝi kreskas ankoraŭ pli ekzotikaj plantoj. Ĝi havas la plej grandiozan forcejon en Orient-Azio. Tie kreskas ĉirkaŭ 2300 specioj kaj en forcejo ĉirkaŭ 1300.





En tiu mateno ni vizitis la ekspozicion de malriĉa pentristo *Lee Jungseop*, kun interesaj karikaturoj, pri sia propra vivo, en kiu li spertis multajn malfacilaĵojn. Tamen, kiel por multaj artistoj, ili ne estis facile kompreneblaj.



En muzeo pri plonĝistinoj estis montrita la laboro de tiaj virinoj, kiuj dum multaj jaroj plonĝis en la maron por rikolti plantojn kaj kapti marajn bestojn.



Posta propono estis vizito al "Kafo-domo". Ĉu por trinki kafon? Eble, sed ĉefe por piedbano en varma akvo kun kafo-solvaĵo. Al la varma akvo deĵoranto aldonis ian oleon kaj eblis ŝmiri la piedojn per kremo. En la akvo jam troviĝis saketo da kafo. Per premado la kafo malrapide dissolviĝis en la akvo. Ŝajne ĉiuj agrable ĝuis tiun pied-banadon.



En proksima restoracio jam pretiĝis bongusta manĝo. Sur ĉiu tablo troviĝis kaserolo kun legomoj kaj maraj bestoj. La tuto kuirigis surloke, deĵorantino per tondilo tranĉis la krabojn kaj aliajn marbestojn. Neniam troviĝis tranĉiloj ĉe la manĝo-tablo, nur metalaj bastonetoj kaj kuleroj. Bongustaj manĝoj en agrabla internacia etoso.




Anstataŭ grimpi sur la "bovo-insulo" estis proponita proksimiĝi al ĝi per ŝipo. Tiam eblis ĝin foti preskaŭ laŭplaĉe, tamen la moviĝo de la ŝipo kaj la nombro da pasaĝeroj tion iom malfaciligis.



Antaŭ ol reveni al restoracio kaj poste al la hotelo, kelkaj kuraĝuloj volonte grimpis tiun monton malantaŭ nia grupo. La nivelo-diferenco estis je 250 m ĉefe atingeblaj per longaj ŝtuparoj. Ĉiuj sane revenis. En la lasta tago ni ĝuis lastajn pejzaĝojn de tiu insulo antaŭ ol reflugi al Seulo. Ni varme dankis al niaj gvidantinoj, kiuj bone zorgis pri la tuta grupo.

Andreo



<b>Espéranto France-Est</b>		<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>
<b>La Informilo</b>	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>
<b>Rédaction: Redaktoro:</b>	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.69.54.46.93	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Jacques PINEDA	03.89.42.88.54	pineda.ventron@gmail.com
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Madette AST	03 87 01 32 85 06 70 94 11 84	madette20@hotmail.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Yves STUTZ	03.89.39.83.14	stutzyves@gmail.com
S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammach@gmail.com	

<b>Abono al La Informilo →</b>	17 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <i>Paiement par virement au compte</i>
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Kongreso en Seulo	15. Nia vilaĝo kaj naturo	<p><b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b>  <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b>  bulletin d'information bilingue sur l'espéranto  édité par l'association culturelle  <b>Esperanto France-Est</b>  MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République  <b>54000 NANCY</b>  Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b>  Rédacteur provisoire : André Grossmann  Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b>  Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p>
2. ILEI-kongreso en Busan	16. Enigmo kaj humuraĵoj	
3. ILEI-kongreso en Busan	17. Mediteranea E-semajno	
4. Tuttaga ekskurso de ILEI	18. Abonoj kaj kotizoj	
5. Gejunuloj ĉe ILEI-kongreso	19. SAT-kongreso en Koreio	
6. Postkongreso sur insulo Ĝeĝu	20. UK en Seulo	
7. Postkongreso sur insulo Ĝeĝu	21. Tuttaga ekskurso vilaĝo Hanok	
8. Postkongreso sur insulo Ĝeĝu	22. Tuttaga ekskurso vilaĝo Hanok	
9. Komitatoj kaj Menuo	23. Koreaj manĝoj	
10. Angulo de la prezidanto	24. RET Rusiaj Esperanto-tagoj	
11. Fontenoy la Joute	25. RET Rusiaj Esperanto-tagoj	
12. Turismaj malnovaj trajnoj	26. Barato: urbo Kolbato	
13. Turismaj malnovaj trajnoj	27. Barato: urbo Kolbato	
14. Nia vilaĝo kaj naturo	28. Fotopaĝo UK en Seulo	

## Angulo de la prezidanto

Karaj gesamideanoj,



Dum la lastaj du jaroj adiaŭis nin forpase pluraj eminentaj samideanoj: Detlev Blanke, Paul Gubbins, Franz-Georg Rössler, kaj plej laste nia fama poetino Marjorie Boulton. Des pli granda estas la bedaŭro, kiam oni kutimis sorbi iliajn sciojn dum kongresaj prelegoj.

Vi diros: tia estas la vivo! Jesja, kiam temas pri individuoj, sed kio pri "forpaso" de movado? Estas ja espero. Jen! Kiam mi estis juna esperantisto, mi jam konstatis, ke ĉefe mezaĝuloj/maljunuloj konsistigis la esperantistaron. Nun ankaŭ mi maljuniĝis, sed esperon en la daŭrigo de la movado donis al mi la bildoj, kiuj atingis min el Koreio: ĉeestis la kongreson multaj junaj homoj el Azio. André Grossmann partopreninta la UK-on kaj la ILEI-kongreson tion konfirmis. Ni esperantistoj do plu esperu!

E.L.

### Informis Libera Folio: Forpasis Marjorie Boulton, famega poetino

La 30-an de aŭgusto 2017, en la aĝo de 93 jaroj, forpasis Marjorie Boulton, unu el la plej ŝatataj Esperantaj verkistoj, honora membro de UEA.

La verkista kariero de Marjorie Boulton komenciĝis en 1949, kiam ŝi havis 25 jarojn, per poemaro en la angla lingvo. Post tio ŝi publikigis tridekon da libroj en plej diversaj ĝenroj. Poemoj, prozo, teatraĵoj, literaturaj studoj en la angla kaj en Esperanto aperis el ŝia plumo, sed ankaŭ amuzaj artikoletoj en *Monato*. La anglalingva publiko tutmonde konas ŝin kiel seriozan literatur-scienciston, la esperantlingva – same tutmonde – ankaŭ kiel poeton kaj grandan amikon de katoj.



Jen interesa iniciato de la Moskva Esperanto-Asocio.

Esperanta Poŝtkrucigo estas interŝanĝo de poŝtkartoj kun esperantistoj el diversaj landoj kaj regionoj.

Ĉu ne estas bona ideo sendadi belajn bildkartojn al aliĝintaj esperantistoj, hazarde elektitaj de la aŭtomata sistemo? Ĉu ne estas agrable trovi en sia leterkesto bildkarton kun salutoj en Esperanto de nekonataj (aŭ konataj!) sam-lingvanoj? Ĉu vi, aŭ via E-gelernanto, aŭ via E-gekonato estas tia homo? Do, ne prokrastu — aliĝu tuj!

Venu al la paĝaro: [bildkarto.weebly.com](http://bildkarto.weebly.com)

kaj plenigu tre simplan aliĝilon. Vi TUJ ricevos retmesaĝon kun ies adreso!

Elektu belan bildkarton, surskribu ĝin, afranku ĝin per taŭgaj poŝtmarkoj kaj forsendu ĝin. Kaj atendu surprizojn en via leterkesto! Ĝuu belecon de la bildkartoj kaj amikemon de esperantistoj el la tuta mondo! Invitu aliajn esperantistojn al la bildkart-interŝanĝo!

La 25-an tagon de ĉiu monato ĉiuj aliĝintoj ricevos novan adreson por sendi bildkarton.

Pacience atendu, senprokraste sendu!

**Esperanto  
Poŝtkrucigo**

*Ĉu vi deziras interŝanĝi bildkartojn  
kun esperantistoj  
per ordinara poŝto?*

**Aliĝu tuj!**  
**[bildkarto.weebly.com](http://bildkarto.weebly.com)**

**MASI** La projekton iniciatis  
Moskva Esperanto-Asocio MASI

### Fontenoy la Joûte

Kiel kutime ni budumis en la vilaĝo de la libroj, en la 13a de aŭgusto 2017.

Bedaŭrinde komence pluvetis. Ĉar la esperon ni ne perdis, baldaŭ sunetis...sed ne tre longe daŭris.

Malgraŭ la griza vetero, la vizitantoj venis multnombraj. Pluraj interesiĝis pri la lingvo kaj promesis eklerni ĝin rete.



### Tri pomarboj « Esperanto » alvenis en Loreno

Emmanuel Rolland, kiu kreis « La ĝardeneton de la lernantoj », en Côtes d'Armor (Francio) instigis tiun projekton. Esperantisto, kiu rilatis kun li, miris, kiam dum printempa tago, li malkovris en amaso da kruda stonaĵo, florantan pomarbon. Dum la sekvanta aŭtuno, ĝi produktis belajn, ruĝajn pomojn, kies specio estis nekonata. Li proponis greftaĵojn al Emmanuel, kiu dank'al siaj kapablecoj, reproduktis aliajn ekzemplerojn de tiu-ĉi arbo. Ĉar tiu-ĉi specio nekonatas, ili decidis ĝin nomi « la pomo Esperanto », pomo de la espero. Inter tiuj klonoj, tri alvenis al Loreno ĉe Liliane.

Sekvota



## La turista trajno de Abreschviller

La amatoroj de piedmigradoj, kiuj trapasis la voge-  
zajn padojn inter Abreschviller kaj la montaro Do-  
non, ne povis, antaŭ kvardek jaroj, traŭri aŭ laŭiri  
unu el la multnombraj valoj, de la monto Donon al  
Abreschviller, sen renkonti fervojon kun ne kutima  
trakŝpuro 0,70 m.

Se, plena de scivolemo, unu aŭ la alia laŭiris tiun  
trakon, li ne bezonis iri ĝenerale longan vojon antaŭ  
ol renkonti, ĉu flankan trakon, sur kiu parkis vago-  
netoj plenaj de arbotrunkoj, ĉu disbranĉiĝon de la  
vojo, kiu kondukis al arbara kvartalo en ekspluata-  
do.

Kvankam la plejmulto sciis, ke la trako tiel renkonti-  
ta apartenis al la reto de la arbara fervojo de Abres-  
chviller, malmultaj el ili konis ĝian historion, konsis-  
ton kaj manieron ekspluati ĝin.

Nuntempe, restas nur el tiu reto ses kilometroj, la  
plej proksimaj al Abreschviller, ekspluatataj por  
turismaj celoj.

Tiu gvidlibro celas memori la originon kaj la histo-  
rion de tiu reto, kiu, laŭ onidiroj de fakuloj, estis, en  
sia apogeo, unu el la plej gravaj arbaraj fervojoj de  
Eŭropo.

Ĝi rakontas poste ĝian transformiĝon ekde ĝia krei-  
ĝo ĝis nun.

## Geografia kaj ekonomia situacio.

La norda parto de la montaro (alteco 1.009 m) kon-  
sistas el vastaj arbaraj ondumaj zonoj, kun procento  
de arboplantado je 80 %.

La naciaj arbaroj de Abreschviller, de Walscheid kaj  
de Saint-Quirin formas ensemblon de 11.500 hekta-  
roj, unupece, inter la altecoj 300 kaj 1.000 metroj.  
Pluraj valoj: Blanka Sarre, Ruĝa Sarre, Flava Zorn,  
rivereto de Abreschviller kaj ties alfluaĵ riveroj tra-  
sulkas la montaron.

Tiu arbaro, konstituata de 75 % de rezinaj arboj  
(abioj), kaj 25 % de foliaj arboj (fagoj kaj kverkoj)  
produktas proksimume 75 000 kubajn metrojn ĉiu-  
jare.

Ĝi estas mastrumata de la "Nacia Ofico de Arbaroj".

Dum longa tempo, la malforta denseco de la popula-  
cio kaj la malsameco de la penetrantaj vojoj estis la  
kialo de la sub-ekspluatado de tiu arbaro.

Ekde la kelkaj centroj de ekspluatado, kiuj situis en  
la malplej malfacile alireblaj zonoj, la faligitaj trunkoj  
estis kondukitaĵoj per sledoj aŭ bovtrenataj ĉaroj ĝis  
etaĵ segejoj instalitaj ĉe la flanko de la torentaj rivereto-  
toj, kies motoran forton ili prenis, kaj kiuj estis uzataj  
tre ofte por konduki la produktaĵojn per flotado al  
Abreschviller.

## Ekapero de la fervojo.

Ĉirkaŭ la jaroj 1850, la Arbara Oficejo planis amplek-  
san programon por la konstruado de arbaraj fervojoj,  
kiu estis nur partete realigita.

En 1884, la germana arbara administracio anstataŭi-  
gis la projekton de arbaraj fervojoj per la konstruo de  
fervojo, supreniranta laŭ la rivereto de Abreschviller  
ekde la loko Zweibach sur 5 km, baldaŭ daŭrigita  
por atingi 13 km en 1888.

La elektita trakŝpuro estis tiu de fervojoj de la Prusa  
Armeo, t.e. 70 cm. Estas la sola konata kazo por la  
enkonduko en Francio de tiu tipo de trakŝpuro.

Kelkajn jarojn pli poste, projekto por la konstruo de  
fervojo je normala trakŝpuro inter Sarrebourg kaj  
Abreschviller estis planata. La demando aperas, ĉu la  
fervojo je normala trakŝpuro devas esti daŭrigata ĝis  
la malsupra finstacio de la arbara fervojo en Zwei-  
bach, aŭ ĉu tiu lasta devas esti daŭrigata ĝis Abres-  
chviller.

La enplanto de gravaj segejoj en Abreschviller, inter  
ili nacia segejo mastrumata de la arbara administra-  
cio, puŝas al elekto de la dua solvo: la normala trako  
haltos en Abreschviller, kies stacidomo estos kons-  
truata en 1892.

## Pligrandigo de la arbara fervojo.

La 30an de marto 1892, fortega ŝtormo ruinigas la  
montaron, kaj metas teren ĉirkaŭ 200.000 m<sup>3</sup> da  
ligno.

Fronte al tiu giganta kvanto da materialo rapide  
ekspluatenda, la arbara administracio tuj plenumas  
ĉiujn projektojn de plivastigo de la studata etŝpura  
trako, t. e. proksimume 35 km da linioj (ne inkluditaj  
la parkotrakoj kaj la flankaj evit-trakoj)

Ili estas konstruataj en kvar monatoj. Oni aĉetas  
materialon, kaj oni instalas en Abreschviller, prok-  
sime al la nacia segejo, atelieron por la bontonado kaj  
riparado de tiu materialo. Ekde la 5a de julio 1892, la  
unuaj vaportrajnoj traŭras la montaron.

Kelkajn jarojn poste, tuj kiam la ligno terenĵetita de la  
ŝtormo de 1892 estis finekspluatita, la arbara admin-  
istracio konsideris, ke la disvolviĝo de la trakreto  
estis tro granda por la normalaj bezonoj.

Post studado, parto de la ekzistanta trakreto estis  
proklamita senutila: la fervojo estis malmuntita, la  
reloj kaj la troa materialo venditaj.

En 1902, nova ŝtormo alfrontigis la arbaran adminis-  
tracion kun 180.000 m<sup>3</sup> da forĵetita ligno urĝe eks-  
pluatenda.

Nova plivastigo de la trakreto estis decidita. En 1918,  
ĝi entenis 50 km da vojoj. Ĝi daŭre plivastiĝis ĝis  
1939, por atingi 73 km, inter kiuj 9 km da flankaj  
evit-trakoj kaj parko-trakoj.

## Ekspluatado.

Ĉiutage, du trajnoj surpasis la trakreton: unu sur la linio de la Zorn, la alia sur tiu de la ruĝa Sarre kaj de la rivereto de Abreschviller.

Matene, ili kondukis la malplenajn vagonetojn, kaj lasis ilin almonte preter la ŝarĝadejoj.

La lignaĵoj tranĉitaj en la arbaro kaj malsuprenigitaj ĝis la fervojo estis ŝarĝitaj sur vagonetojn kiuj, poste, estis kondukitaj per graviteco sur la plej proksima flanko helptrako, alvale, kaj prenitaj fine de la tago per trajno, kiu trafis Abreschviller.

Ĉiu vagoneto estis jungita al la posta kaj al la antaŭa, same al la lokomotivo, pere de ligna stango fortigita de fera cilindro kaj posedanta ringon de jungado je ĉiu ekstremaĵo. Tiu sistemo ebligis gravan senapogan ŝarĝaĵon ĉe la ekstremaĵoj de la vagonetoj, faciligis la transporton de longaj trunkoj sen gravaj problemoj de stabileco aŭ de adaptiĝo al la kurboj.

Ĉiu trajno tiel prenis 50 ĝis 70 tunojn da trunkoj.

La dungitaro uzata por la funkciado de la fervojo (inkluzive la ŝarĝistojn kaj la dungitaron de bontenado) nombris kvindek da personoj. La jara trafiko nombris proksimume 35 ĝis 40.000 m<sup>3</sup> ĉirkaŭ 1958, t.e. proksimume duonon de la tuta produktaĵo de la montara arbaro.

La alia duono estis rekte envojigita per tervojoj, kiu pli kaj pli penetris en la montaron.

## Malprogreso de la trakreto.

En 1960, la trakreto de la fervojoj por la ligno-transporto nombris 61 km da fervojoj kaj 92 km da ŝoseoj (42 km da arbaraj tervojoj, kaj 50 km da ŝoseoj klasifikitaj publikaj).

La fervojo kaj la ruliĝanta materialo prezentis gravan eluziĝon, kiu necesigus gravajn apartajn laborojn por la prizorgado, eĉ por la renovigo. Aliflanke, ekaperis kamionoj por trunkoj kaj arbaraj traktoroj kun remorkoj, kies uzado montriĝis pli fleksebla kaj pli favora ol la fervojo.

La lignaĵo, ŝarĝita sine de la arbaro mem, povis esti rekten alsendita, sen iu plia manipulado, ĝis la uzanto.

Tiuj konsideroj kondukis la arbaran administracion decidi la progresivan forlason de la fervojo kaj la konkretigon de ŝosea programo de 85 km, inter ili 48 destinitaj al la anstataŭigo de la fervojo de la Ruĝa Sarre.

Jam laŭirante la ŝoseon al la monto Donon laŭ dekdu kilometroj, ĝi ne bezonis esti anstataŭigata.

Poste, komplementa programo da padoj kaj trenvojetoj, por faciligi la alproksimiĝon al la lignoproduktejo estis instalitaj.

La malmunto de la fervojo komenciĝis en 1962.

En 1964, 40 km da fervojoj estis malmuntitaj, kaj je la fino de la jaro 1966, post 75 jaroj da bonaj kaj lojalaj servoj, la trakreto ĉesis esti uzata por la transporto de la lignoproduktaĵo.

## Al turisma reutiligado

Kiam oni ĉesis la ekspluatadon de la trakreto por la transporto de la lignoproduktaĵo, la arbara administracio jam de pluraj jaroj disponigis ĝin por turistaj grupoj, kiuj petis tion.

Iujn sabatojn kaj dimanĉojn, turistaj vojaĝoj estis organizitaj sub la prizorgado kaj respondeco de tiu administracio.

Tiel, tuj kiam estis konata la decido de "Administracio por Akvoj kaj Arbaroj" forlasi la uzadon de la fervojo por la transporto de lignaĵo, la ideo konservi sekcion de linio kun la celo de turisma ekspluatado konkretiĝis.

Konsente kun la turism-oficejo de Abreschviller, kaj kun la subteno de la arbara administracio, la strasburga delegacio de la Federacio de la Geamikoj de la Duarangaj Fervojoj (FACS) prezidata de Dr Singer baldaŭ konstituas komitaton cele la studadon por la repreno de sekcio de linio kaj ĝia regula ekspluatado dum la someraj semajnfinoj.

Unue, estis planita la ekspluatado de la vojo Abreschviller-Brechpunkt, t. e. ĉirkaŭ deko da kilometroj. Sed la ekstremaĵo de tiu irvojo estis aparte malebena, ĉar ĝi enhavis du sinsekvajn "kuspojn" (revenojn inverse), por ebligi la transiron de brutala niveldiferenco. Tiu situacio necesigintus submeton al trudoj kaj apartajn singardemojn, ĉar temis pri transporto de la vojaĝantoj en plena sekureco.

Al la komitato montriĝis, ke tiu cirkonstanco, same kiel la traveturota distanco, konsiderinde plipezigus la elspezojn de ekspluatado. Nu, por havi eblecon proponi la vojaĝon je taŭga prezo, la Komitato rapide konsciis, ke necesis limigi siajn ambiciojn, eĉ je sia granda bedaŭro.

La komenca Komitato, post ĝia transformiĝo al "Asocio de la Arbara Fervojo de Abreschviller (ACFA)", sub la prezidanteco de Doktoro SINGER, povis akiri diversajn subvenciojn kaj, ekde junio 1968, regula semajnfina servo funkciis helpe de dizela "lokomotivo" (kiu necesigis la minimumon de elspezoj en riparado) kaj tri platformoj transformitaj al malfermajn veturilojn.

Tiu unua jaro da funkciado estis sukceso, kiu superis la plej optimismajn antaŭvidojn, ĉar ne malpli ol 10.000 turistoj estis transportitaj dum la tuta sezono. Kuraĝigita de tiu sukceso, la Asocio pliiĝis la strebadon, kio permesis taŭg-aranĝi la finan stacion Granda-Soldato, refari kelkajn longopartojn da fervojo, kiuj nepre bezonis riparadon, reordigi la vaporlokomotivon Heilbronn 020 + 020 T, sistemo Mallet, akiri du veturilojn fermittajn por la vojaĝantoj.

Tiuj lastaj estis ceditaj laŭ tre favoraj kondiĉoj pere de la svisa fervojo de la Wangenalpbahn (linio, kiu ĉepas la montaron de la Jungfrau proksime al Interlaken), kiu eĉ realigis en siaj atelieroj la transformon de la organoj de ruliĝado, por ebligi al tiuj veturiloj cirkuladon laŭ la trakŝpuro 0,70 m, dum ili estis konceptitaj por cirkuli laŭ vojoj kun trakŝpuro 0,80 m.

# Nia Vilaĝo

*Homo kaj naturo*



En artikolo pri la Mondaj Ludoj, vi legis ke unu el ĝiaj sportoj estas i.a. rok-grimpado. Tio estas tre malfacila kaj foje danĝera disciplino, tial nur malmultaj ĝin praktikas. Kutime oni preferas marŝi aŭ promeni tra malaltaj kaj ne krudaj montoj, malrapide kaj sen troa fort-uzo. La pejzaĝoj ĝueblas kaj la turisto povas paŭzi ie ajn kaj ripozi. Surprizos vin vasta panoramo, post kiam vi surpasas novan deklivon.



Sed naturamika promeno ne estas ja sporta konkurso. Por tiuj serĉantan defion kaj eksciton de danĝeraj situacioj, oni konstruas altajn murojn. En ties truoj estas firme instalitaj ŝtonoj de diversaj grandeco, formo kaj koloro.



Grado de la malfacileco varias: tio povas esti muretoj malgrandaj, kun angulo 60-grada, apenaŭ por infana amuzo. Sed la plej risk-emaj fortuloj povas grimpi sur konstruaĝo kiu similas pli al plafono ol al muro! Kiel ĝin konkeri? Tamen kelkaj sukcesas.... Kaj la konstruistoj antaŭvidis ke falo de alta muro povas esti tragika, tial la plankon kovras dika sponĝtavolo. Krome, kiel montras la apuda foto, ĉiun akompanas kolego kun sekuriga ŝnurego.

Dum la Mondaj Ludoj, la sportistoj uzas tiuspecajn murojn. Tiam la arbitra komisiono pritaksas la konkurantojn kiu plej sukcese (kaj verŝajne plej rapide) atingos la superan randon. Sed tiu sporto, same kiel grimpado en altaj montoj, taŭgas nur al tiuj bezonantaj ekscito-tremoj. Por ordinaraj homoj ĝi estas malfacila kaj tial nur malmultaj en ĝi partoprenas. Sed ne rapida marŝado en montaro estas tre populara kaj refreŝiga: vi povas ĝui la novan vidajon se vi nur persistas transiri la sekvan monton.

Cetere, por havi plezurajn promenon, ne ĉiam necesas veturi al montaraj regionoj. Montetoj troviĝas ja en multaj lokoj kaj por tia ekskurseto sufiĉas eĉ kelkaj horoj.

Kiel vi povis legi en antaŭaj n-roj de "NU" – ekde longa tempo, la Unuiĝintaj Nacioj (UNO) deklaras internaciajn jarojn (aŭ eĉ jardekojn) dediĉitajn al iu naturmedio, homgrupo aŭ problemo.



Kaj tiel, antaŭ 15 jaroj oni anoncis la *Internacian Jaron de Montaroj - 2002* kun la celo atentigi pri neceso protekti la naturon en montaraj regionoj kaj promocii bonajn vivkondiĉojn por la homaj komunumoj kiuj vivas tie.





## Protektindaj plantoj: **Edelvejso**

Sub la ĉeftitolo de "Nia Vilaĝo" videblas larĝa panoramo de montaro kaj fronte ornamas ĝin la blanka floro de edelvejso (*Leontopodium*). Ĉi tiu planto konsistigas la familion de asteracoj (*Asteraceae*). Ĝia latina nomo (leontopodium) memorigas ke laŭforme tiu floro similas al piedo de leono (*léon* = leono kaj *pódion* = piedo). Al genro edelvejso apartenas pli ol 30 specioj.

Oni trovas ilin en altaj regionoj de Eŭroazio – de Alpa Montaro ĝis Siberio, Mongolio kaj Ĉinio. La plej konata estas alpa edelvejso (*Leontopodium alpinum*), kiu kreskas en Alpoj kaj Karpatoj. Tial ĝi fariĝis la simbolo de montaraj regionoj en Aŭstrio, Svislando, Pollando, Slovakio, Rumanio, Bulgario kaj Slovenio.

Ĉi tiu planto kreskas prefere sur kalkŝtonaj deklivoj, sur alteco de 1800 ĝis 3000 metroj. Ĝi aperas en diversgrandaj grupoj kaj somere ornamas montojn kvazaŭ per blankaj tapiŝoj. La nomon de *edelvejso* diskonigis la samtitola kanto "Edelweiss" – populara ankaŭ en esperanta traduko:

*Edelvejs', edelvejs', min salutas matene;  
blanka hel', pura bel', min rigardas amplene.*

*Frosta neĝer', gemo de mister', donas vi esperon,  
edelvejs', edelvejs', benu mian hejmleron.*

Laŭ folkloro tradicio, kiam juna montarano donacas edelvejsan floron al knabino, tiam li deklaras al ŝi amon kaj sindediĉon. Tamen, por ke amasaj turistoj ne pluku ĝin, edelvejso apartenas al strikte protektataj plantoj.

## Montara Sav-Serva Organizado

Lerteco akirata dum sporta grimpadu tre utilas en Montara Savo-servo – MSS. MSS aktivas en montoj, por helpi la turistojn kiuj troviĝas en malfacila situacio (ekz. pro misorientiĝo, nereveno al hotelo ĝis vespero, tranokta restado sur altaj montopintoj, falo el roko, glaĉerfendoj, neĝblovo, lavango aŭ subitaj veter-ŝanĝoj).

Ofte la turistoj mem senzorge "altiras" la danĝeron kiam ili neglektas avertajn komunikaĵojn disaŭdigataj per loka radio-stacio. En tiel danĝera laboro, funkcias la tre bone preparitaj specialistoj, same profesiaj kiel volontuloj. Unue oni devas trovi la perditan personon, kiun la familio eble serĉas ekde kelkaj tagoj...

Kiam oni vidas ke la trovito perdis konscion pro gravaj vundoj aŭ frostiĝo, la MSS-personaro estas bone trejnita pri medicina helpo. Ili ankaŭ disponas pri necesaj medikamentoj kaj konvena ekipaĵo.




Se ne eblas trovi la perdiĝinton dum certa tempo, tiam oni sendas helikopteron, kiu flugas eble plej malalte kaj traserĉas la montojn: (2:50)

<https://www.youtube.com/watch?v=Gy4S85wQPCo>. Dum en loko, en kiu oni rimarkis la homon ne estas facile alirebla, tiam oni ĵetas longan ŝnuron kun speciale projektita seĝo, en kiu oni sidigas la vunditon. En urĝaj kazoj, aviadilo povas tuj transporti la viktimon al plej proksima hospitalo. MSS-organizaĵoj ekzistas en multaj landoj, kie troviĝas altaj montoj kaj sube ni montras MSS-blazonojn el Nepalo, Francio, Slovakio, Pollando (kun desegnita serĉ-hundo).


Sed la plej densa MSS-reto ekzistas en Svislando. La organizaĵo nomiĝas tie REGA (*Schweizerische Rettungsflugwacht*, france: *Garde aérienne suisse de sauvetage* - Rega), kiu disponas pri 17 kuracistaj helikopteroj en 10 help-bazoj. Tial ili povas atingi iun ajn monton en Svislando dum apenaŭ 15 minutoj.



## Ni lernu per enigmoj kaj distraĵoj



*Ni ridu*



En vendejo estas viro kun krianta bebo:

„Alberto, trankviliĝu, ĉio estos bona, nur paciencon.“

Vendistino: „Tio estas bonege, ke vi parolas kun via fileto kiel kun plenkreskulo. Tiel elkreskos el li pacienca, egal-anima homo.“

Viro: „Sinjorino, vi eraras. Mi estas Alberto!“

Kiam viro malfermas al virino pardon de aŭto?

1. Kiam li havas novan aŭton.
2. Kiam li havas novan virinon.

Furzulo

- Sinjoro kuracisto, mi ne scias kio okazas al mi, sed mi kontinue furzas. Feliĉe oni ne povas rimarki tion, ĉar ĝi nek odoron nek sonon havas.

Eĉ nun, dum ni paroladas, mi jam furzis minimume trifoje. Donu al mi iun medikamenton kontraŭ tio!

La kuracisto skribas recepton por la maljunulo, kaj li revenigas lin post tri tagoj.

La maljunulo alvenas post tri tagoj malkontente.

### HORIZONTALE

1. Scienc' pri antikvaj monumentoj.
2. Restaj' studata per la scienco de la unua linio. Korta bird'.
3. Literatura kaj arta doktrin' en Eŭropa dum la 17a jarcento.
4. Ĝerminta gren' uzata por biero. Ĉina filozofia princip'.
5. Tute sen vokalo. Pronomo. Voĉoson'.
6. Seksa impuls'. Odora floret'.
7. Maldika korpa vastul'.
8. INVERSE: homa grupo, havanta difinitajn kulturajn tradiciojn. Rondforma bakaj' el firma pasto.
9. Alumina mineral'.
10. Unua virino. Jura akt'.
11. Subtera part' de fungo. Pronomo.
12. Odisea hero'. Malkomponiĝ'.

### VERTIKALE

1. Fakul' pri konstruado. Aŭstralia bird'.
2. Cilindroforma objekt'. Kvietaj animstat'.
3. Demanda pronomo. Ĥirurgia proced'.
4. Fari ke iu eniras per subita moviĝo. Regnokodo de Hispanujo.
5. Pronomo. Rand' de refaldita ŝtofo.
6. Dolĉa likv'. Plata kuket'. Koleopter' boranta galerion sub ŝelo.
7. Pronomo. Aparat' uzata por ŝaŭmigi lakton.
8. Stomako (en kunmetaĵoj). Stat' de iu, kiu vigle fiksas sian intelekton.
9. An' de ekstrema ŝijajismo en Barato. Banka endosaj'.

- Kion vi donis al mi? De kiam mi manĝas tiun medikamenton, ĝi ankaŭ plu ne havas sonon, sed ĝi estas tiom malbonodora, ke oni ne povas elteni ĝin!

- Nu, tiam via flarsenso jam estas en ordo.

Nun mi skribas ion por plibonigi vian aŭdkapablon.

SOLVO de la KVE de La Informilo 178

### HORIZONTALE:

1. ĴURNALIST.
2. OREADO.
3. KELT.
4. RORI.
5. ETERNE.
6. OS.
7. REGIONISM.
8. RAKI.
9. NO.
10. NOC.
11. MAS.
12. IZAKISO.
13. PRO.
14. KODIS.

### VERTIKALE:

1. ĴOKER.
2. NAP.
3. URETERO.
4. RELEGACIO.
5. NATRIK.
6. AD.
7. NOIMAK.
8. LOREN.
9. AKO.
10. INSID.
11. SPROSO.
12. SI.
13. TEISM.
14. FOS.



# MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO 2018

Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

**24an de Februaro - 3an de Marto 2018**

Ĉu ankoraŭ frostas en via regiono ? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdal-arboj !  
Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro...

## INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :

**Monique Prezioso,**

92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio  
prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88

**Christine Graissaguel,**

Les Iles d'Or, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus  
kris\_grai@hotmail.fr - tel. 0033(0)4 94 95 66 18

kursoj	Kursgvidantoj	Nivelejo
1	Christine GRAISSAGUEL	Vera Komencanto
2A	Jarka MALA	Komenc-Parolanto
2B	Kristin TYTGAT	Progres-parolanto
3	Nina PIETUCHOWSKA	Diskuto/analizo

## ĜENERALAJ INFORMOJ

**Alveno :** De la stacidomo St Raphaël: aŭ per buso n° 7601 al Saint-Tropez ĝis haltejo **Le Val d'Esquière Les Issambres**, aŭ per takσιο.

**Akcepto :** sabaton la 24an de Februaro - 15:00 - **Fermo :** sabaton la 3an de Marto - 14:00 (post la tagmanĝo).

**Kurs-horaroj :** 9:00-12:00 kaj 18:00-19:00

**Partopreno en kursoj (3-nivelaj) :** Elektu vian deziratan kurson en la ĉi-suba tabelo.



### Liberaj posttagmezoj

**por :** bankuracado en proksima marakva banejo (800m), vizitado de Fréjus (klostro), Saint-Raphaël (muzeo), Nico, Menton, Maures-monteto (mimozo kaj pied-ekskursado), Saint-Tropez, Sainte-Maxime, Bormes-les-Mimosas, bazaro en Ventimiglia (Italio, nur vendrede), ktp.

## ALIĜILO AL M.E.S. 2018

partoprenanto	Nomo/persona nomo	Naskiĝ-jaro	Kurso
1a			
2a			
3a			
Adreso			
Telefono: _____ Ret-adreso: _____ @			
Mi loĝos ĉe Résidence Le Val d'Esquière: jes / ne			
Mi partoprenos de la 24a de Februaro ĝis la 3a de marto 2018 : jes / ne			
<b>Sendu al Christine Graissaguel</b> (vidu adreson ĉi-supre)			

**Ne forgesu viajn marŝoŝuojn por pied-ekskursi sur montetaro.**

**Distraj vesperoj** far la hotelo, Esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... Kunportu viajn amuzajn kanzonojn, ludojn, ktp.

**Eblas ban-kuracadi en proksima mar-akvo-terapiejo.**

### RESUM-PAGO

Aliĝkotozo ..... €  
Restado ..... €

TUTA SUMO ..... €

Sumo pagebla :  
- **per ĉeko** je la nomo de "Esperanto club St Raphaël-Fréjus", sendota kun aliĝilo al: Christine Graissaguel, Les Iles d'or A, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus, Francio)  
- aŭ **per bankoĝiro** al : Société Marseillaise de Crédit  
IBAN: FR76 3007 7049 3926 6980  
0020 041 BIC: SMCTFR2A ESPE-  
RANTO-CLUB- 83700 ST RAPHAEL

### ALIĜKOTIZO (ne repagebla) :

Plenkreskulo : 60 €       Paro : 100 €

### LOĜADO

- Kompletaj semajna restado (plenkreskulo) : .... x 360 € = ..... €  
 Rabatebleco por infano (bv informiĝi) : x --- € = ..... €  
 Suplemento por unulita ĉambro: ..... x 110 € = ..... €  
 Popersona suplemento por ĉambro almara: x 42 € = ..... €  
 Mi volas mem partopreni en programo per :

### ALVENO

Trajne (St Raphaël)       Fluge (Nico)       Memveture je la .....horo.

### EVENTUALA MESAĜO VIA :

## ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2018 ĝis 2020

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta  $20 - 66\% = 6,80$  eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2017 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2018.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2017, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2018	2019	2020	
		Abono por la papera versio:	17 eŭroj	17 eŭroj	17 eŭroj	
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj	
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj	
<b>UEA</b>	MG	<ul style="list-style-type: none"> <li>• Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado.</li> <li>• Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 34 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago).</li> <li>• Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto</li> </ul>				11 eŭroj
	MJ(-T)					26 eŭroj
	MA(-T)					64 eŭroj
Pag-manieroj	<b>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:</b> <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2018 por 1208					
	<b>2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de:</b> <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al .... ktp por 2018, 2019					
	<b>3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto:</b> IBAN: DE13 5451 0067 0091 8566 76 - BIC: PBNKDEFFXXX Je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)					
	<b>4. Per internacia ĝiro</b> je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)					

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

### "De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 12 + 2,80 = 14,80 eŭroj

### **Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)**

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

### **Knabaj petolaĵoj** Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

### **La harplektaĵo de Sylvie Reff** Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

### **Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo**

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 5,80 = 17,80 eŭroj

### **Poŝamiko** Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn

ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. 5,10 + 1,40 = 6,50 eŭroj

## La 90-a SAT-KONGRESO 29. 7.-5. 8. 2017

Ĉi-jare la unuan fojon, la SAT-kongreso okazis en Azio. Post la impona 102-a UK en Seulo 105 kamaradoj el 16 landoj ĝuis la 90-an SAT-kongreson en apudseula urbo *Gimpo*, proksime de la bordo ĉe la Flava maro. Ĉefe la azianoj havis ŝancon konatiĝi kun alilandanoj, praktiki la lingvon kaj sperti la SAT-etoson. Junaj japanaj partoprenantoj tre aprezis personan kontakton kun esperantistoj el diversaj landoj.

Koreanoj bonvenigis nin per rideto, varma koro, frateco, amikeco kaj malfermitaj brakoj. Ni loĝis en komforta hotelo *Yakam*, kie okazis la antaŭviditaj programeroj. Krome, je dispono al la kongresanoj estis senpaga aliro al kuracaj banakvoj. Tion pluraj el ni profitis ĝissate.

Ĉe la alveno, post la registriĝo kaj ricevo de la kongresmaterialo ĉiuj partoprenantoj povis elekti (laŭ sia grandeco) verdan T-ĉemizon kun surskribo: “SAT-tutmonda solidareco”. La kongresa temo estis: “Demokratio en nuntempa mondo”. La semajna programo estis klare afiŝita sur apartaj paneloj kaj ankaŭ la kongreslibro en pli granda formato ol kutime (A4) enhavis ĉiujn necesajn informojn. Sabate dum la interkona vespero prezentiĝis du muzikbandoj de la “Paca agado sur strato”.

Dum la malfermo Vinko Markovo donis informojn pri SAT al la novuloj. Post la salutvortoj de PK kaj OKK sekvis salutoj de kelkaj organizoj: Rob Moerbeek salutis nome de UEA, Dieter Rooke nome de komunistoj, Franciska Toubale nome de Radio Melbourne kaj mi nome de fervojistoj. Malantaŭ la hotelo ni fotiĝis ĉe grandega banderolo kun E-slogano “Se ni kune sonĝas kaj praktikas, Alia Mondo Eblas!” Tuj poste sekvis prelego pri kandelluma revolucio, kiu sukcesis forigi la prezidantinon de Koreio. Posttagmeze en la sama tono daŭris parolado pri: “Multitudoj kaj absoluta demokratio”. Interesan sciencfiksan prognozon pri evoluo de Guglo kaj ĝia pasporto prezentis Hiongun KIM. Li kaptis intereson de la aŭskultantoj.

Vespere ni ĝuis belegan folkloran prezentadon de la ensemblo “Espera Mondo”. Sonis diversaj, al kelkaj el ni, nekonataj instrumentoj kaj tamburoj. Ĉe la fino ni povis kunkanti la faman kanton *Ariari*, muziki kaj danci kun la bele vestitaj aktoroj. Ĝojo kaj rido invadis ĉiujn ĉeestantojn.

Ekde lundo komenciĝis kutimaj SAT-programeroj: estis prezentitaj agad- kaj jar-raportoj. Okazis diversaj diskutoj, prezento de la konferenco pri unuiĝo de la du koreaj ŝtatoj okazinta dum UK, laborkunsidoj kaj kunvenoj de frakcioj-liberecana, vegetara, komunista, sennaciista, verdula, liberpensula.

Inter prelegoj elstaris tiu pri “Nuklea akcidento en Fukuŝima” prezentita de Hori Jasuo. Pri antropologio, kartografio kaj koloniismo prelegis Guilherme Fians el Brazilo. “Enrigardon al la korea literaturo” prezentis Rob Moerbeek. Pri “Koreaj lingvo kaj historio” prelegis Ho Song. Pri “Esperanto kaj klasikaj lingvoj” donis informojn Saioa Escobar. “La rusan revolucion 1917” rememorigis Dieter Rooke. Pri “Pejzaĝo kaj ĝia influo sur nin” kaj belegajn bildojn prezentis Maria Butan el Rumanio. Pri sia domo en Kreto parolis Annie Grente. Pri siaj spertoj rilate al veganismo parolis Paŭlino Gaborit. Pri “La memoro de E-movado” pri Eduardo Vivancos, nuntempe 97-jaraĝa parolis Xavi Alcalde, “Notoj pri monda kapitalismo” skizis Miyazawa Naoto el Japanio. Pri ĉina Tajpeo por Tajvano ni eksciis de Albengo. Pri “Fak-laboro en Fejsbuko informis Neil Blonstein. Tradukan laborgrupon gvidis Annie Grente. Ege bela ateliero montriĝis pri kreado de mandaloj per sablo. Hori Jasuo muzikis per diversaj malgrandaj muzikiloj akiritaj dum liaj multnombraj vojaĝoj. Ni eksciis pri la eldona fako kooperativa. De Alberto Calienes ni ricevis informojn pri Kubo kaj de Alfonse Waseka pri la Demokratia Respubliko Kongo.

Kulturaj vesperoj estis dediĉitaj al muzikprezentoj, kantoj kun gitaro kaj revoluciaj kantoj. Belan koncerton prezentis la litova ensemblo “Sepa kaj Asorti”. Kun scivolemo ni spektis teatran komedion “La malfermilo” prezentita de Saŝa Pilipoviĉ kaj Franciska Toubale. Spektinda estis ankaŭ aŭkcio de esperantaĵoj iniciita de Tahira Masako (nomata Masakato). Estis kolektitaj pli ol 300 eŭroj por la SAT-movado. Dum la distra vespero ni ĝuis korean operon *Ariari* de la familio Lee Eunwoo. Japanan Te-ceremonion prezentis Huzimoto Hideko.

Interesaj ekskursoj gvidis nin al diversaj lokoj de la lando. Belega estis tiu al *Buyeo*, kie ni vizitis admirinde ravan lotusan ĝardenon kaj poste muzeon kaj templon. Alia, ne malpli interesa montris la “Pacan observejon”, en *Ganghwa* insulo, kie ni estis plej proksime al Norda Koreio, situanta trans la rivero Han. En la samloka muzeo multaj papermesaĝoj atestis pri deziro reunuiĝi. Plie ni vizitis fortikaĵon kaj la plej malnovan templon de Koreio.

La lastan tagon, dum la kvara laborkunsido, estis ellaboritaj kaj prezentitaj Gvidrezolucio kaj Deklaracio. Vespere okazis fermo de la kongreso kun donacoj kaj dankoj pro sindonema laboro fare de la organiza teamo. Ĉe la fino Saŝa Pilipoviĉ prezentis la venontjaran urbon Kragujevac en Serbio, kie okazos la 91-a SAT-kongreso de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2018; la OKK transdonis al li la flagon.

La ĉi-jara kongreso estis riĉa el movada, kultura, distra, kaj turisma vidpunktoj. Abundis interesaj prelegoj, konversacioj, belaj momentoj kaj homa interkompreniĝo.

*Liba Gabalda*



La duan fojon la UK okazas en Suda Koreio en ties ĉefurbo Seulo. La prestiĝa evento disvolviĝis fine de julio en Hankuk Fremdlingva Universitato. Kolektiĝis 1174 geesperantistoj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj allogataj de la azia kulturo. Novuloj spertis esperantistan etoson kaj ĝuis interesajn momentojn en amika rondo.

En la ĉirkaŭaĵo de la Universitato flirtis E-flagoj anoncantaj la eventon. Koreaj samideanoj produktis amason da belegaj afiŝoj kaj banderoloj por diversaj Esperanto-okazaĵoj. Dum la daŭro de la kongreso ili konstante kaj pasie laboris por nia bonfarto.



La inaŭgurtago bonvenigis nin pluve. Tamen tio ne malhelpis entuziasman renkonton kun malnovaj kaj novaj geamikoj. En la enirhalo la kongresanoj povis admiri kelkajn ekspoziciojn: fotoj el pasintaj kongresoj, pri L. L. Zamenhof, pri Esperanto kaj admirinde belaj estis ventumiloj. Eblis sin vesti kaj fotiĝi en reĝaj kostumoj.

La kongreso konsistis el la kutimaj programeroj de movada foiro, kleriga lundo, tago de lernado, merkredaj tuttagaj ekskursoj, junulara programo, komitata forumo, strategio kaj kunsidoj, traktado de la kongresa temo, kiu ĉi-foje estis: "Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo".

Okazis IKU-AIS sesioj, lingvaj kursoj kaj KER ekzamenoj, kunvenoj de diversaj asocioj, SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado), LIBE (Ligo Internaciaj de Blindaj Esperantistoj), IKUE-KELI, (kristanaj organizoj) ISAE (sciencistoj) IKEF (komercistoj), IEJA (juristoj), TEĴA (ĵurnalistoj), IREK (komunistoj), TADEN (nefumantoj) kaj aliaj.

Kunvenis ankaŭ legantoj de Esperanto, ateistoj, Akademio de Esperanto, Afrika-, Oomoto- kaj Ŭonbulismo movadoj. Okazis multaj aliaj interesaj programejoj, inter kiuj pluraj prelegoj pri Koreio, Aŭtoraj duonhoroj, Oratora kaj Belartaj konkursoj, Aŭkciado. Ne mankis komuna fotado, urba akcepto, bankedo kaj kongre-

sa balo, kiun animis la litova grupo Asorti. Ĉi-foje ne okazis strikta kontrolo ĉe enirpordoj al la diversaj okazaĵoj. Ankaŭ neniu estis priŝtelita laŭ mia scio. La kongresanoj povis manĝi je modestaj prezroj en studenta manĝejo.

Enkondukiĝis nova programero Korea Kulturĉambro, kie ni povis gustumi korean teon, mem ornami ventumilojn per sekigitaj floretoj, lerni danci kaj sekvi prezentojn de korea folklorkulturo.

Ekster la programo okazis Internacia Pontkunveno en la Parlamentejo pri la Unuiĝo de la korea Duoninsulo, kiun ĉeestis 130 personoj el 21 landoj.

Estis elektitaj du Honoraj membroj de UEA kaj disdonataj diplomoj pro elstaraj agadoj, Oratora kaj Bel-artaj konkursoj, premio Deguĉi, atestiloj pro 50- kaj 40- jaraj membriĝoj en UEA. Estis eldonita poŝtmarko kun portreto de L. L. Zamenhof kaj serio da belaj bildkartoj.

Kongresa Kuriero "La Kandellumo verda" anoncis ĉiujn novaĵojn, ŝanĝojn en la programo, impresojn de partoprenantoj, en la listo aperis novaliĝintoj ktp. Kiel ĉiam, ampleksa estis la libroservo.

Gaja surstrata manifestacio kun tamburado sin direktis al loko, kie okazis la futbalmatĉo, en kiu unuafoje gajnis la esperantista teamo je granda ĝojo de ni ĉiuj.

Pluraj ĉiutagaj ekskursoj ebligis konatigi nin kun la naturo de Koreio, kiu konsistas el maro, montoj, riveroj, kampoj, vilaĝoj, urboj kaj urbegoj, palacoj, ĝardenoj, temploj kaj aliaj diversaj kulturaĵoj de jarmila historio.

Dum vesperaj kulturaj programeroj prezentis koncertojn Kajto, Asorti, Ĵomart kaj Nataŝa, Eruda Li kaj Maju. La teatraĵon "El la vivo de insektoj", prezentis la ĉeĥa ensemblo DOMA. La trupo Espera Mondo prezentis koreajn tradiciajn artojn. Dum la Nacia vespero prezentiĝis la simfonia orkestro *Arirang* kaj ni povis spekti diversajn admirindajn programerojn. Ankaŭ la Internacia Arta kaj Azia vesperoj estis mirindaj.

En la fermo de la Universala Kongreso ni eksciis pri la venontaj kongresuroj. En la jaro 2019 la kongreso okazos en Lahti, Finnlando kaj en 2020 en Montrealo, Kanado. La venontjara UK disvolviĝos en Portugalio, en ĝia ĉefurbo Lisbono de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto.

Bonetosa estis la fermo de la kongreso al kiu kontribuis la nederlanda grupo Kajto. Laste prezentiĝis infanoj el la Infana Kongreseto, kiuj venis saluti nin en rekorde granda nombro.

Ĉiuj, kiuj povis partopreni la ĉi-jarajn kongresojn en Koreio devas senti sin feliĉaj. Koreaj sindonemaj kaj laboremaj samideanoj ne sensiluziigis nin pri la pasintjare promesita grandioza kongreso kun surprizoj. Ni plene ĝuis ilian gastamon en amikeca harmonio.

*Liba Gabalda*

**Tuttaga ekskurso al la vilaĝo Hanok en Jeonju**

La proponita tuttaga ekskurso E3 celis la vilaĝon Hanok en Jeonju. Du aŭtobusoj veturis tien dum 3 horoj. Survoje estis paŭzo ĉe aŭtoŝoseaj parkejo kaj vendejoj. Tre verŝajne iel simila al multaj aŭto-parkejoj, tamen tiom korea aspekto. Hanok estas kiel subĉiela muzeo kaj signifas "korea tradicia domo", ĝi konsistas el pli ol 800 tiaj koreaj tradiciaj konstruaĵoj.



Post la impona enir-pordo vaste etendiĝas ĉarma lotuso kampo. Ĝi allogas por fotado.



Post tiu unua vizito, ni estas invitataj al restoracio por manĝi *bibimbapon* (miksita rizo kun sezonaj legomoj). Fakte 6 gastoj estis invitataj por vigle miksi la



rizon kun la ĉirkaŭaj legomoj, taŭgaj iloj estis metitaj je dispono. Post tiu amatora mikrado veraj kuiristoj pli multe kunmiksas la tuton aldonante eĉ pli da rizo. Certe bongusta manĝo, kiun multaj koreoj preferis manĝi per kulero. Dume, iom paradokse, iuj eŭropanoj klopodis uzi manĝ-bastonetojn. Aliaj estus preferintaj manĝi la rizon kaj legomojn iom pli aparte por mem decidi pri la proporcioj. Tamen tio ne estas la korea tradicio.



En muzeo oni multe klarigis pri la vivo kaj eĉ pri la konstruomaniero en pasinta tempo en tiu vilaĝo. Surplanke estis desegnita la situacio de la manova vilaĝo apud la modernaj konstruaĵoj de Jeonju.





Nia posta celo estis vizito al templo de la reĝa portreto.  
 Ĉe la enirejo troviĝis la impona portreto de korea reĝo Taejo. (1335-1408) Li estis la fondanto de la dinastio Joseon en 1392, li regnis dum ses jaroj kaj cedis la povon al siaj filoj Jeongjong en 1399 kaj poste al Taejong en 1400.



Naskita Yi Seong-gye la 11an de oktobro 1335 de patro, milita oficiro de la Yuan-dinastio, li iĝis generalo kaj militis por forpeli la mongolojn de la Goryeo-regno, kiu poste iĝis Koreio.

Li nomis sian dinastion Joseon omaĝe al

malnova sam-noma dinastio de antaŭ 4000 jaroj, ŝanĝas ĝian nomon al Yi Dan kaj en 1394 deklaras Seulon la ĉefurbo.

Li mortis en 1408 kaj estis post-morte proklamita imperiestro en 1899 fare de Kjong, kiam ĉi-tiu fondis la korean imperion.



Survoje pluraj koreinoj surhavis belajn fest-robajn kaj akceptis esti fotitaj. En monro-fenestroj kaj surstrate similaj roboj estis proponitaj.



Reven-voje ni retrovis la trafiko-plenan ĉefurbon Seulo



## Bibimbap, Kimchi, Banchan... kaj tondiloj

Koreio estas regiono konata por la vario kaj kvalito de sia kuirado, kiu diferencas de tiuj de la apudaj landoj: Japanio kaj Ĉinio.

Spicaj gustoj, atente preparitaj pladoj kun zorgo pri kolora kaj estetika aspekto karakterizas la korean kuirarton, kie **Bibimbap** plej elstaras.



**Jeonju Bibimbap** estas konsiderata kiel unu el la plej bonaj nutraĵoj en Koreio sur riza bazo. Ĝerموj de sojfabo, maldikaj strioj de bovaĵo, freŝaj sezonaj legomoj, fungoj, kaŝtanoj, nuksoj kaj pino-nuksoj kovras ĝin. Aldone spicigas ĝin pasto de fermentita ruĝa korea papriko kaj dekoracias ĝin ovo. Povas enesti 30 specoj de ingrediencoj, inkluzive ginkgo, ĉiu el ili havanta specifan guston kaj koloron. **Jeonju Bibimbap** ludas kun ekvilibro inter karbonhidratoj, grasoj, proteinoj, vitaminoj kaj mineraloj. Ĝi estas konsiderata kiel perfekta manĝo, kiu ampleksas la saĝecon de la prapatroj kaj sciencan teorion. Oni servas ĝin en ŝtona ujo.



**Kimchi** estas la korea nomo donita al konservitaj legomoj, kiel ĉina brasiko, longa blanka rafano, melongeno, kukumo, mustardo-folio, papriko, kun aldono de spicoj kaj fermentitaj fiŝoj. Ĝi estas esenca parto de la korea manĝo por ĉiuj sociaj klasoj kaj en ĉiuj regionoj. Ekzistas ĉirkaŭ ducent specoj en Koreio. **Kimchi** el ĉina brasiko (**Baechu-kimchi**) estas la plej konata.

Lakto-fermentado ne estas la sola, kiu respondecas pri ĝia dieta elstaro. Ajlo, korea papriko, zingibro, cepo, algoj kaj saŭco de fermentita fiŝo; la kumeto de ĉi tiuj spicoj donas al **Kimchi** tiel unikan guston, sed ankaŭ pligrandigas ĝiajn sanigajn kvalitojn. Kontraŭe al tiu, ofte tre spicigita, ekzistas aliaj, nomitaj Blanka **Kimchi**, kiuj ne enhavas fortan paprikon.



**Kimchi**, estas konsiderata kiel la nacia plado kaj manĝata preskaŭ ĉiutage. En 2013 la tradicia maniero prepari **Kimchi** por la vintro – **Kimjang** – estis inkludita en la listo de nemateriaj kulturaj heredaĵoj de UNESKO.

**Banchan** estas devigaj akompanoj al ĉiuj pladoj, ĉu en restoracio, ĉu hejme. Temas pri pluraj specoj de etaj aldonaĵoj prezentitaj en malgrandaj ujoj, kaj kutime oni servas almenaŭ kvar aŭ kvin. Inter ili troviĝas diversaj specoj de **Kimchi** kaj neniam malestas **Baechu-Kimchi**, ĝerموj de sojfaboj, lotuso, etaj fiŝetoj, algoj, legomoj.

Por manĝi supon kaj rizon oni uzas kuleron, por aliaj pladoj metalajn manĝo-bastonetojn.



En Koreio oni ne devas timi uzi **tondilojn**, ili anstataŭigas tranĉilojn. Sur la unua bildo dekstre oni vidas, ke tondiloj estas uzataj por tranĉi nudelojn

de Glacio-Supo (**Mul Naengmyeon**). Sur la dua montriĝas, ke oni tondas grandan pecon de kuirita porka viando, kiu troviĝas en la poto kun legoma supo.



Koreoj tre ŝatas manĝi rostitan viandon. Iliaj malaltaj tabloj jam havas enkonstruitan rondan roŝto-kradon, kie la viando estas freŝe pretigata antaŭ iliaj okuloj, poste tranĉita per tondiloj je etaj pecoj kaj ĉiu manĝas ĝin laŭ sia emo. La plej populara opcio estas meti pecon de viando en laktukan folion, aldonante **Kimchi** kaj eble alian **Banchan**, envolvante ĉion kune kaj metante tiun pakajeton tuj en la buŝon.

Same kiel preskaŭ ĉiu azia, la korea kuirado zorgas pri la animo kaj la korpo. Ampleksa gamo de bele ornamitaj pladoj ĝojigas niajn okulojn kaj instigas por manĝi. Korea kuirado certe estas kulinara aventuro. Valoras ĝin sperti.


## RET (Rusiaj Esperanto-Tagoj).

Rusiaj Esperanto-Tagoj estas tradicia aranĝo de esperantistoj de Rusio.

En somero 2017 ĝi okazis de la 2a ĝis 9a de aŭgusto, en urbo Poŝeĥonjo (Jaroslava regiono) en pitoreska loko.

Ĉi-jara temo: "Idea, filozofia kaj religia fono de Esperanto". La renkontiĝo estis dediĉita al 140-jariĝo post naskiĝo de Ivan Ŝirjaev (esperantisto, verkisto, pastro).

Raportas pri tiu aranĝo Galina



### En la programo de RET okazis:

Lego-Tago omaĝe al 140-jara jubileo de I. Ŝirjaev (ĉefan prelegon faris esperantisto Pastro-monaĥo Taŭriono).

### Somera Universitato kun prelegoj:

Zamenhof kiel reprezentanto de la "rusa kosmismo", Folozofiaj aspektoj de lingvoplanado, Lingvoprotektado de Ĥanta-Mansa aŭtonoma distrikto-Ugrujo k.t.p.

Dediĉe al 25-jariĝo eldonejo Impeto prezentis novajn librojn kaj projektojn.

Koncertajn programojn prezentis Mikaelo Bronŝtejn, Mikaelo Povorin, Andreo Obrezkov (kun grupo "Ekvinokso"). Tre interese pasis aŭtora vespero de Ludmila Novikova. Ĉiuj dezirantoj plibonigi sian lingvan nivelon havis eblecon viziti lingvajn kursojn.

En programo estis multe da ekskursoj. RET-anoj konatiĝis kun urbo Poŝeĥonje kaj partoprenis urban feston,

(foto 2) veturis al vilaĝo Kukoboj, kie en muzeo ĉiujn salutis Avino Jaga (persono el komun-slava folkloro) (foto 3)



Ne forgesbla estis veturado per traktoro laŭ danĝera arbara vojo al detruita preĝejo, kie dum 30 jaroj diservis I. Ŝirjaev. Memore al Pastro Ŝirjaev okazis Liturgio. (foto 4)







En urbo Ribinsk (la dua laŭ grandeco urbo de Jaroslavlva provinco kun 200.000 loĝantoj) estis pieda ekskurso. Ni konatiĝis kun malnova parto de urbo, promenis laŭ kajo. (foto 5)

Post RET ĉiuj dezirantoj partoprenis tritagan ekskurson. La unua tago estis ekskurso al vilaĝo Vjatskoje. Je 38 km nord-oriente de Jaroslavllo sur rivero Uhtom-




⑥

ko estas la plej bela vilaĝo de Rusio, kiu fariĝis la unua membro de la Asocio de la plej belaj vilaĝoj. La vilaĝo kun loĝantaroj proksimume 1000 aspektas kiel malgranda urbeto kun du 18-jarcentaj preĝejoj,

ŝtonaj domoj (plejparto pli ol 100-jaraĝaj) kaj varia reliefo. (foto 6)

Dua tago ni ekskursis en Jaroslavllo. Ĝi estas granda urbo (ĉ. 600.000 loĝantoj) je 280 km nordoriente de Moskvo. Ni promenis super la Volga bordo kaj survoje konatiĝis kun arkitekturaj monumentoj. (foto 7) Tre plaĉis al ĉiuj konatiĝi kun urbo Kostromao.



⑦



⑧

Ĝi estas provinca centro je 65 km oriente Jaroslavllo kun loĝantaro ĉ. 275.000. La urbo troviĝas sur du bordoj de Volgo, tamen ĝia historia parto troviĝas sur la maldekstra, ĉe enfluo de la rivero Kostromao.

La urbo aperis en la 12 jc. En la urbo estas kelkaj brilaj preĝejoj ekstere kaj

interne de la 17-a jarcento, katedralo de la Dia Bapto (16 jc.) kun la plej adorata ikono de St. Teodoro. Tre alloga aspektas klasikisma centro de la urbo kun grandegaj "vendovicoj", fama fajrobrigada turo kaj radie irantaj de la centra placo stratoj. (foto 8)

La plej fama loko en Kostromao estas la Ipatjeva monaĥejo-fortikaĵo, konata ekde 1432 kaj historie ligita kun du malamikaj inter si bojaraj, poste caraj, dinastioj: Godunov-oj kaj Romanovoj. En ĝi estas belegaj konstruaĵoj de la 16-19 jc., elstaraj freskoj kaj ikonoj en la baziliko de Triunio.

(foto 9)



⑨



La urbo **Kolkato** situas ĉe la delto de la rivero Gango (*Ganga*), ĉe la enfluo de ties brako Huglo (*Hooghly*) en la golfon de Bengalo, parto de la Hinda Oceano. Kolkato estas la tria plej granda urbo en Barato. Ĝi kuŝas je 10 metroj super la marnivelo. En la urbo mem vivas pli ol kvin milionoj da enloĝantoj. Kun la ĉirkaŭaĵo ĝi havas 15 milionojn. La historio de la urbo komenciĝis en la 17-a jarcento, kiam kuniĝis kelkaj vilaĝoj. En la 18-a jarcento ĝi fariĝis por ne longa tempo la ĉefurbo de la brita kolonio Hindio, poste ĝis la jaro 1947-a de Bengalio.

Ĝi estas nomata urbo de palacoj. Unu el la plej admirindaj lokoj



estas *Victoria Memorial* konstruita el blanka marmoro en renesanc-itala stilo inter 1906 kaj 1921 jaroj por memorigo de la reĝino *Victoria*, tiama imperiestrino de Hindio. Ĝi estas ĉirkaŭata per belega ĝardeno laŭ angla




stilo. Ĝia silueto speguliĝas en apuda baseno. Nigra anĝelo el bronzo sur la pinto de la kupolo reprezentas triumfon. Ĉe la

enirhalo vizitantoj admiras imponan monumenton de la reĝino *Vikroria*



La plej signifoplena loko por enloĝantoj de Kolkato kaj alloga por turistoj estas la tiel nomata *Kalighat*. Templo konstruita en 1809 sur iu jam antaŭe ekzistanta sanktejo. Ne tre rimarkenda laŭ la arkitekta aspekto, sed interesa pro la religieca ĉirkaŭaĵo. Ĝi estas tre frekventata pilgrimloko. Malantaŭ la oferaĵoj oni povas vidi en niĉo nigran sanktulinon *Kali*, kiu estas dekoraciita per oro kaj arĝento. Ĝi simbolas detruan energion kaj



postulas sango-viktimojn. Ĉiu-tage estas oferita kaprido. En la ĉirkaŭaĵo vagadas malriĉuloj, almozuloj, kripligitaj bestoj kaj homoj.



Aŭtune estas en Barato celebrata la plej aprezata festo *Durgapudza*, reveno de diino *Durga* al sia naskiĝlando. Loĝantoj preparas grandiozajn, lukse ornamitajn konstruaĵojn *Pandaly*, por specialaj ritoj. Ili modlas el

koto diversajn homfigurojn, kiujn ili poste farbas kaj bele vestas por dekoracii la internon.





Tre alloga kaj vizitata estas la scienca areo *Science city*, la plej granda en Barato. Temas pri speciala centro inaŭgurita en 1997. Ĝi estas eduka loko por ĉiuj aĝoj kun diversaj ekspozicioj kaj eksperimentoj bazitaj je sciencaj konceptoj. Kombiniĝas distriĝo kun edukado. Teknologiaj inventaĵoj, panoramaj videoj, interaktivaj ludoj provokas scivolemon ne nur ĉe infanoj. Ne mankas divers-specaj dinosaŭroj.

*Science city*, la plej



Alia vizitinda loko estas ekologia urba parko kun ebla promeno per barko. Surloke troviĝas pluraj areoj kun malsamaj aktivecoj por familioj kun infanoj. Agrabla promenejo ĉirkaŭ la lago kondukas al bambua, bonsaja, roza kaj kakta ĝardenoj kaj ankaŭ al bela muzika fontano.



Ĝenerale la trafiko en Barato estas densa kaj ne havas regulojn. Fakte havas, sed neniu respektas ilin. Ŝoforoj mem kreis siajn proprajn trafik-regulojn. Ne ekzistas voj-strioj, gajnas la plej granda, potenca kaj laŭta vehiklo. Hupado avertas preterpasantojn kaj aliajn trafikantojn pri eventuala danĝero. Tamen, ŝajne ne estas multaj kolizioj kaj akcidentoj, sed jes oftaj ŝtopiĝoj.

Kolkato estas la lasta barata urbo, kie oni trovas homojn tirantajn rikiŝojn. Kelkaj el ili eĉ ne posedas ŝuojn kaj nudpiede kondukas pasaĝerojn aŭ transportas varon tra malpuraj stratoj de la urbo.



Interesa estas la maniero kolekti monon en buso. Krom la ŝoforo la buson akompanas kondukto.



Li ne bezonas havi monujon ĉe mane, kolektitan

monon li metas inter la fingroj de sia mano kaj lerte manipulas la monbiletojn.

Kolkato estas la ĉefa komerca kaj financa centro kaj la plej grava urbo de orienta kaj nord-orienta Barato. Stratoj estas inunditaj per komerco kaj divers-specaj bazaroj. La homoj pulsadas kiel formikoj de loko al loko.



La plimulto el la loĝantaro de la urbo Kolkato konsistas el bengalaj homoj. Nepalanoj, ĉinoj, tamiloj kaj pluraj aliaj minoritatoj apartenas al pli malgrandaj komunumoj de Kolkato.

**Nia foto-paĝo montras la komunan foton de UK en Seulo faritan en la komenco kaj ĉe la fino la alvenon de la infanoj el la infano-kongreseto. Fotoj de Andreo**





# El nia libroservo



## Informoj

la libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon en Schwäbisch Gmünd la 6/8ajn de oktobro 2017.

Ĉiuj libroj aperintaj en la Informilo 178 atendos vin!

Sed ne eblos kunporti ĉiujn el la 700 titoloj de ka libroservo,

La listo de la libroj aĉetebraj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France

Est : <http://esperanto.france.est.free.fr>

. Se iu precipe allogas vin: avertu min per retmesaĝo, mi nepre kunportos ĝin (sed vi ne estos devigata aĉeti ĝin)!

Ne alvenis novaj libroj de post la lasta komuna semajnfino,  
Ĝis baldaŭ!

Jean-Luc Thibias

[libroservo.efe@laposte.net](mailto:libroservo.efe@laposte.net)

### Por mendi librojn:

- Vi sendas vian mendon
  - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE
  - per ret-poŝto al "[libroservo.efe@laposte.net](mailto:libroservo.efe@laposte.net)"
  - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
- Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
- Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.  
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"  
**IBAN** : FR 98 20041 01010 0280076H031 97  
**BIC** : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

<i>Mendilo</i>		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo: